GRVPo ESPERANTISTA
"FIDO KAJ ESPERO"
VALLADoLID

AÑO 1992 SEPTIEMBRE-OCTUBRE Núm 147
DIRECCION POSTAL: Apartado 119; 47080 VALLADOLID
Adherido a la FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

=================================================================

## EDITORIAL


Como sabeis por el anterior boletín, el 77 Congreso Universal de Esperanto se ha celebrado en Viena, y verdaderamente podemos decir que ha sido un éxito, pues han participado más de 3000 personas de 69 paises, lo que realmente significa una universalidad total, y usando como lengua común únicamente el Esperanto.

A la inauguración del Congreso asistió el nieto del Dr. Zamenhof, quien pronunció el discurso inaugural, y entre las autoridades que saludaron, para nosotros fué especialmente importante la presencia del Embajador de España en Viena Sr. Ochoa, quien animó e invitó a los presentes a participar en el próximo Congreso Universal de Esperanto, que como sabeis se celebrará en Valencia.

Todos los Congresos terminan con una serie de Resoluciones que este año fueron muy importantes dados los acontecimientos que están ocurriendo en algunos paises de Europa. Si el tema del Congreso era "la casa común europea" vemos que salvo en los doce Estados de la Comunidad hoy no puede hablarse de casa común, El Congreso hizo constar que aún existen muros económicos, religiosos, lingüísticos y culturales que dividen a los pueblos de Europa y que causan sufrimiento a millones de hombres. Por ello, dados los valores espirituales que encierra nuestro movimiento esperantista se condenó la guerra como medio para solucionar los problemas, se advirtió contra el peligro de las tendencias racistas, y se puso el acento en que Esperanto, desde hace un siglo, trata de extender la idea de que todos los pueblos son iguales y los hombres tienen unos derechos humanos, que actualmente se están violando.

La última Resolución propuso crear un fondo especial de ayuda a los esperantistas de la ex Yugoslavia, que están sufriendo los horrores de la guerra en su pais y expresar la solidaridad con ellos. Como veis este año, la idea interna de Esperanto ha tenido que aflorar mucho más y con más actualidad dados los acontecimientos en Europa. Esperanto también significa solidaridad.

77-a UNIVERSALA KONGRESO



De la 25-a de julio ĝis la 1-a de augusto okazis en Vieno la nunjara Universala Kongreso, kun partopreno de iom pli ol tri mil esperantistoj de 69 landoj. Kiel kongresejon oni elektis la "Austria Center", impona konstruajo situanta ekster la centro de la urbo sed tre bone komunikata per metroo.

La unua grava programero, estis la solena inauguro, en kiu oni prezentis la kongreson, kiel "la plej grandan U.K. post la dua mondmilito en la okcidento". Post la enkondukaj vortoj de la Prezidanto de UEA s-ro Wells kaj la legado de salutojn de la gravuloj, venis la momento de la bondeziroj de la ambasadoroj de diversaj landoj. Por ni hispanoj estis tre grava, la saluto de la ambasadoro de Hispanio en Vieno, S-ro Miguel Angel Ochoa, kiu per elokventa parolado arde invitis la kongresanojn al la venontjara UK en Valencio.

La plej grava parto de la solenajo estis la parolado de L.Zaleski-Zamenhof, nepo de la kreinto de Esperanto, kiu regalis nin per pensiga festparolado, vera kanto al la interna ideo de Esperanto.Li parolis pri la okazintajoj kiuj antau la dua Mondmilito kaj eĉ nuntempe konstituas "obstinajn barojn inter la popoloj dividitaj", kaj li deziris ke la komuna europa domo, temo de la nuna UK, faciligu la efektiviĝon de la bela sonĝo de l'homaro.

Kiel sciate, multaj kaj samtempaj estas la okazantaj programeroj dum U.K,tiel, dimanĉe, okazis la ekumena diservo en la Votivpreĝejo, kaj bela sed simpla Austria Vespero. Laulonge de la semajno okazis diversaj kunvenoj, i.a. tiu de Europa Esperanto Unio, AIS, ILEI, Asocio de Juristoj, k.t.p. tiel kiel la jam prestiĝaj sesioj de la Internacia Kongresa Universitato, kie mi prelegis pri "Neutraleco au impliikiĝo" traktante la aktualan temon pri la ebla aliĝo de Austrio al la Europa Komunumo.

En la nunjara Kongreso, la valenciaj samideanoj multe volis sperti kaj eĉ lerni, se tio estus ebla, por nia venontjara evento, kaj ekde la jaudo, oni instalis specialan budon por ricevi aliĝilojn, kaj ĉefe informi pri la Valencia urbo.

Multaj diskutrondoj pri la nunjara kongrestemo okazis, tiel kiel la normalaj kunsidoj de la Komitato de UEA en kiu nia lando estis reprezentata de s-ano Luis Hernández, kaj kie nunjare estis reelektita kiel Prezidanto de UEA S-ro Wells por kvarjara periodo.

La transdono de la flago al Hispanio estis grava kaj kortuŝa, ĉar por tiu celo venis ekde Hispanio S-ro González Lizondo, vicurbestro de Valencio kaj Parlamentano, kiu nome de la venontjara UK-urbo,ricevis la flagon, kaj esperante kaj poste ankau hispane kore invitis partopreni la venontjaran Kongreson.

Do, bona kongreso, kaj la esperantistoj atendos unu jaron ĝis kiam Valencio ricevos nin varme kaj entuziasme. Sed intertempe, ni ne forgesu ke la hispanaj esperantistoj devas esti konsciaj ne nur de la graveco havi UK en nia lando, sed de nia propra kaj individua respondeco helpante la valencianojn.

M.R.UREÑA

## GEKNABA FENESTRO

### Dolĉa Kaĉo

Iufoje estis malriĉa, pia knabino, kiu vivis en soleco kun sia patrino kaj ili havis neniom plu por manĝi. Tiam foriris la knabino arbaren kaj tie renkontis oldulinon, kiu jam bone konis ilian mizeron kaj donis al ŝi poton, al ĝi devis diri ŝi: "poto, kuiri", tiele ĝi kuiris dolĉan pizkaĉon kaj, se ŝi diris: "poto, ĉesu", tiam la poto ĉesis kuiri. La knabino alportis la poton al sia patrino hejme kaj ambaŭ ili fariĝis liberaj de la malsato kaj manĝis dolĉan kaĉon tiel ofte kiel dezire.

Iutage eliris la knabino straten. Tiam diris la patrino: "poto,kuiru". Ek komencis la poto kuiri kaj la patrino manĝis ĝissate. Do, ŝi volis ke la poto ĉesu, sed ŝi ne sciis la trafan vorton.Do la poto daurkuiris senĉese kaj la kaĉo jam atingis la pordon kaj fluis eksteren jam pleniginte la kuirejon kaj la tutan domon, poste la duan domon kaj poste la straton kvazau ĝi volus plenigi kaj satigi la tutan mondon kaj ekkestas granda katastrofo kaj neniu scipovas trovi helpon. Finfine, kiam jam restas nur unu domo sen enkaĉigo ĵus revenas la knabino hejmen kaj alparolas:"poto, ĉesu", tiam staras kaj ĉesas kuiri. Sed tiuj kiuj volis iri denove urben devis tramanĝi la kaĉon.

(Fratoj Grimm)

### Nedankema filo

Iam viro estis sidanta antaŭ la pordo de la hejmo akompane de sia edzino, kaj ili havis rostitan kokon antaŭ si intence formanĝi ĝin. Tiam vidis la viro sian oldan patron laŭvoje alproksimiĝi. Rapide li prenis la rostitan kokon kaj kaŝis ĝin pro tio ke li ne volas ke la patro partoprenu la manĝadon. La oldulo alvenis, iomete trinkis kaj foriris. Nu volis la filo meti la rostitan kokon surtable, sed kiam li manprenis ĝin, ne estis plu koko sed bufo kiu sursaltis en lian vizaĝon kaj restis tie por ĉiam. Kaj se hazarde iu volis ĝin forpreni, la bufo rigardis lin kolere kvazau ĝi volus salti sur la vizaĝon, tiele ke neniu kuraĝis ĝin forŝovi.

Kaj la filo devis ĉiutage nutri la bufon kaj kiam li ne faris tiom la bufo manĝis el lia vizaĝo, tiele ke la nedankema filo devis senripoze trairi la mondon.

(Fratoj Grimm)

( Kontribuaĵo de samideano Luis Pelayo por nia bulteno.)

Nuevo Catálogo de Libros

El Servicio de libros de la FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO, que como sabeis tiene su sede en Valladolid, ha publicado un nuevo CATALOGO de veinticuatro páginas en el que por materias, se relaciona cuantos títulos pueden ser solicitados.

El citado CATALOGO se envia gratuitamente a los clientes y amigos de dicho servicio, e igualmente se enviará a todos aquellos que lo soliciten a LIBROSERVO DE H.E.F., Apartado, 119; 47080 VALLADOLID, indicando su nombre, domicilio, distrito postal, población y provincia.

P E R I O D I C O

Grupo Esperantista
"Fido kaj Espero"
Apartado, 119
47080 VALLADOLID